

ktp. Prenante germanlingvan vortaron, ni trovas : ungeschickt (mallerta), unbequem (malkomforta), unglücklich (malfeliĉa), unehrlich (malhonesta), unsauber (malpura), ungesund (malsaniga), ktp; krome : missvergnügt (malkontenta), missachten (malestimi), ktp. Prenante anglalingvan vortaron, ni trovas : unable (malkapabla), unaccommodating (malcedema), unadvised (malprudenta) unamiable (malafabla), unapt (maltaŭge), ktp... Kiam, en Esperanto, oni limigas la »mal«-vortoj al tiuj, kiuj elvokas ion nete malagrablan aŭ malŝatindan, tiam nia lingvosento ne sentas sin kontraŭita. Sed se, krome, ni allasas vortojn — ni diru — »neŭtralajn« (ekz-e akuzi, fermi, kovri, supreniri) kaj formas la kontraŭon per »mal-«, tiam forestas la dezirinda elvokiveco. Laŭ tiu kriterio, nenio estas direnda kontraŭ la klasikaj esprimoj (sur p. 56 de la libro F. F.) : malforta, maljuna, mallaborema, malbela, malfrua, malgracia, malriĉa, malĝoja malutila. Kaj samsence, la jenaj neologismoj estas defendeblaj : basa (malalta), dura (malmola), frida (scienca termino anst. malvarma), lanta (malrapida), streta (mallarĝa), poka (malmulta), k. a. Konvinkan bildon pri mankanta elvokiveco oni ricevas per la jenaj simetriaĵoj ekzemploj : seka (malhumida) kaj humida (malseka), fermi (malaperti) kaj aperti (malfermi); ni komparu ĉi tiujn kun la zamenhofaj komenci (malfini) kaj fini (malkomenci)!

Konklude mi proponas, ke la diversaj demandoj cele al »maksimume klara Esperanto« estu studataj fare de Lingva Komitato, restarigota per decido de la Akademio de Esperanto. La membraro de L. K. konsistu en membroj de la Akademio kaj, eventuale, kelkaj al-elektitaj kunlaborantoj sufiĉe kompententaj. La oficialigo de la decidoj de L. K. apartenu, kiel ĝis nun, al la Akademio mem.

8(091) : 894.511 = 408.92

LA BUDAPESTA SKOLO

(G Waringhien, Vitry, Francio)

— prelego en Internacia Somera Universitato, Budapeŝt, 1966. —

Por bone kompreni kaj analizi la fenomenon »skolo«, estas necese memori pri la origino de la vorto. La greka etimo »sholé« signifis propre »senokupeco« kaj iom post iom aplikigis al la filozofiaj konversacioj aŭ diskutoj, per kiuj la plej scivolemaj spiritoj de la antikveco plenigis tiun liberan tempon; la Romanoj, pruntinte la terminon, parolis pri la platona skolo, la stoika skolo, la epikura skolo ktp. La mezepoko konis la diversajn skolojn de teologoj — la plej fama lasis eĉ sian reziduon en la »skolastiko« — kaj la moderna epoko la diversajn skolojn de sociologoj, de la liberalismo ĝis la historia materialismo. En tiu propra senco, unu skolo havas ĉe sia kapo pensulon, kiu elmetas sistemon sufiĉe novan, koheran kaj ampleksan, por unue akiri la konsenton de kelkaj kleruloj, kaj poste lasi al ĉiu el ili la eblon apliki la saman metodon aŭ la samajn principojn al aliaj studkampoj; sed inter la iniciatoro kaj la sekvantoj ne ekzistas necese komuneco de tempo (la tomismo de la 13a jarcento havas ankoraŭ nun adeptojn) nek de loko (Heidegger, Jaspers aŭ Sartre neniam bezonis kunveni, por fondi la ekzistencialismon).

Jen de kia kunteksto la arthistoriistoj elprenis la vorton, por uzi ĝin en sia fako. Sed en tiu ĉi nova tereno, ĝi ricevis plian specifecon. Ĉar la pikturo esence reflektas la manieron, kiel la okulo de la artisto impresigas de la ĉirkaŭanta medio, de ĝia ĉiellumo, de ĝiaj pejzaĝoj, de ĝiaj vivaspektoj, la vorto skolo alprenis pli strikte

lokan nuancon. Kiam oni parolas pri la flandra aŭ la hispana skolo, pri la skolo de Venecio aŭ de Delft, oni pensas pri grupo da pentristoj, kiuj plejparte originis el tiuj landoj aŭ urboj, kaj esprimadis plej karakterize la guston de ties lokantoj. Oni ne konfuzu skolon kun ateliero: en ateliero unu majstro-pentristo instruis al disĉiploj la sekretojn de sia tekniko, kaj ofte dividis inter ili la plej grandajn komponaĵojn, kies planon kaj finofaran perfektigon li rezervis al si — tiel laboradis Rafaelo aŭ Rubenso. Kompreneble, kiam la disĉiploj eliris al la ateliero kaj komencis memstare produktadi, iliaj verkoj estas ordinare klasitaj en la sama skolo, kiel tiuj de la majstro; sed la du terminoj estas ĉiam distingendaj.

Skoloj en literaturo

Fine ni alvenas al la literaturo, al kiu oni laste etendis ankaŭ la uzon de la vorto, kaj tiu denove akiris plian preciziĝon; ĉar du novaj elementoj tiam penetras en tiun nocion, entrudataj de la kondiĉoj mem de la beletra laborado. La unua estas la konstantaj personaj rilatoj inter la membroj de unu skolo. Oni eble ekmiros pri tiu aserto, pensante, kiel individueca estas la produktado de arta verko. Sed la prilaborado de tia verko estas nur la lasta stadio de longa procezo; ĉiu artisto bezonas por sia inspiro eksterajn ekscitojn, kiuj alportas al li novajn vidpunktojn kaj la deziron ilin esprimi siastile; konversacioj, diskutoj, kritikoj estas necesaj al la fekundeco kaj ekvilibro de de ĉiu grupo de artistoj, precipe de poetoj. Krome oni memoru, ke unu skolo formiĝas ordinare nur kontraste kaj opozicie al iu antaŭa: por trudi al la rutinemo de la legantoj novan stilon, novan aspekton de la arto, por fari tian revolucion elpaŝon, ne sufiĉas havi pri tio projektojn aŭ teoriojn; oni bezonas senti sin apogita de kamaradoj, helpata kaj varmigata de ilia entuziasmo. Jen kial la literaturaj skoloj konsistis preskaŭ ĉiam el aro da samaĝuloj, grupiĝintaj ĉirkaŭ unu pli aĝa verkisto, kiun ili agnoskas kiel majstron, kaj kial la renkontiĝoj inter ili fariĝas tiel regulaj, kvazaŭ rito: ne nur la skolanoj vivas en unu urbo, sed ili kvazaŭ konsekras unu domon, unu ĉambron: tiaj estis la ruĝa salono de V. Hugo, rue Notre-Dame des Champs, kie ĉiusemajne kunvenis la korifeoj de la franca romantikismo, Sainte-Beuve, Vigny, Dumas, Balzac, Gautier, Musset, Nerval, Dalacroix ktp.; tiaj estis la Sabatoj de la Bulvardo Saint-Michel, kie Leconte de Lisle akceptadis la poetojn de la Parnaso, Heredia, Sully-Prudhomme, François Coppée. Verlaine ktp.; tiaj estis la Mardoj de la rue de Rome, kie la junaj adeptoj de la simbolismo, H. de Régnier, Andreo Gide, J. Moréas, P. Valéry, P. Louys ktp. honoris sian majstron Stefanon Mallarmé.

La dua karakterizaĵo de tiuj modernaj skoloj estas io, kion la literatur-historioj ordinare prisilentas, kaj kio tamen estas tre grava ingredienco, mi alduas la eldoniston. Poeto tiurilate tute ne troviĝas en la sama kondiĉaro, kiel ekzemple pentristo: ĉi tiu povas praktiki sian arton sen multe da elspezoj, tolo kaj farboj estas ĉio bezonata, sed en nia civilizacio, se poeto ne disponas revuon aŭ eldonejon, por publikigi siajn versojn, neniu ilin konos, kaj izolite li iom post iom mutiĝos. Por ke naskiĝu kaj fruktu literatura skolo, estas necese, ke ĝi akiru la apogon de simpatianta redaktoro aŭ eldonisto, preta riski sian reputacion kaj kapitalon, publikigante la novigajn verkojn. Tia estis, en la romantikismo, la rolo de Buloz kaj lia »Revue de Deux Mondes« aŭ de la eldonisto Renduel; tia estis la rolo de Lemerre, kiu eldonis ne nur la kajerojn de la »Parnasse Contemporain«, sed preskaŭ ĉiujn verkojn de tiu skolo; tia estis, komence de la simbolisma movado, la rolo de Valette, la eldonisto de la »Mercure de France« kaj de ĝia librokolekto. Tiujn nomojn oni preskaŭ ne konas, sed sen ili, sen ilia entreprenemo kaj realismo, multaj ĉefverkoj simple neniam vidus la lumon.

El tiu rapida skizo oni vidas, kiel decida estis la estiĝo de la diversaj skoloj en la evoluo kaj renoviĝo de la franca literaturo, kiun mi elektis kiel ekzemplon: ĉiu el ili signis unu pluan ŝtupon, unu pluan etapon; sed la bezonateco de literatura skolo sentiĝas precipe ĉe la komenco de ĉiu nova literaturo: la renesanca sep-astra Plejado en Francujo, sub la duobla stelado de Ronsardo kaj de Belajo, estas aparte tipa, kvankam oni facile trovas analogojn en aliaj andoj. Ke la samo prezentiĝis ankaŭ en Esperanto estis do atendeble: vere, ke en ĉi tiu okazo la ŝancoj estis pli malgrandaj, i. a. pro la manko de nacia substrato kaj la dissemiteco de la verkokapablaj esperantistoj. Tamen la sorto volis, ke la necesaj kondiĉoj renkontiĝu tuj post la unua mondmilito. En tiu tempo troviĝis en Budapeŝto kelkaj tridekjaruloj, kiuj fariĝis esperantistoj jam antaŭ la milito kaj dum la teruraĵoj de la jaroj 14—18 ne perdis sian kredon je la estonteco de la lingvo internacia. Ili estis inter aliaj Julio Baghy, Kálmán Kalocsay, Pál Balkányi kaj Tivadar Schwartz; du el ili revenis el la rusa fronto, du aliaj el kaptiteco en la malproksima Siberio; tre diferencaj ili estis per siaj originoj kaj profesioj: aktoro, medicinisto, bankoficisto kaj advokato. Sed unu komunan trajton tiuj kvar posedis, ian superabundon da vivenergio, kiun la mizeroj de la tempo ne sukcesis forsekigi kaj kiu, en ĉiu el ili, emis elverŝiĝi samtempe laŭ diversaj vojoj: Baghy estis ankaŭ instruisto, poeto, organizanto kc., Kalocsay studis la muzikon, la lingvojn ktp. Ke tiuj kvar rimarkindaj homoj decidis uzadi tiun

energion favore al movado, kiu estis ankoraŭ tiam — same kiel nun — pli idealo ol socia realaĵo, kaj tio ĝuste en la tempo, kiam ilia nacio suferis sovaĝan dismembriĝon kaj humiliĝon pro la Trianona Traktato; ke ili preferis apliki sian talenton al lingvo ankoraŭ ne plenformita, dum ili povus en sia nacia akiri pli facile pli grandan renomon kaj profiton — jen atesto de tiu kvazaŭ magia allogo, kiun Esperanto kaj ĝia interna ideo havas por noblaj animoj, kaj kiun eble plifortigis la spertitaj abomenindaĵoj de la hombuĉado.

Naskiĝo de Budapesta skolo

La unuaj antaŭsignoj estis apenaŭ rimarkeblaj. En la komenco de 1921 Balkányi fondis la »Hungaran Esperanto Servon«, kiu eldonis plurajn broŝuretojn, inter ili la du unuajn verketojn de Kalocsay, t. e. liaj unuaj originalaj poemoj (»Mondo kaj koro«) kaj lia unua traduko (»La paĝo de l' reĝino«, hungara komedieto). En tiu sama tempo Baghy fondis la »Esperantan Rondon Amikan«, kiu eldonis siaflanke litografan broŝureton »Bukedo«, la unuan poemaron de Baghy. Kaj en Aŭgusto de tiu sama jaro la du verkistoj kunlaboris en la prezentado de la komedieto antaŭ la postkongreso: Kalocsay ludis la rolon de la poeto kaj Baghy — de la bankiero. Sed tiu scena kunlaborado baldaŭ transportiĝis sur pli firman grundon: en 1922 aperis la unua numero de »Literatura Mondo«. Sur la kovrilo oni legis la nomojn de la Redakta Komitato: Baghy, Kalocsay, Balkányi k. a. kaj tiun de la »Responda Redaktoro«, kiu efektive estis la monsubtenanto, Teodoro Schwartz. La revuo travivis malfacile tiun unuan periodon, de Oktobro 22 ĝis Aprilo 26, kiam la krizo ekonomika en Centra Eŭropo kaj la tro magra apogo de la esperantistaro kaŭzis ĝian malaperon. La kolekto prezentas 40 numerojn, kun entute 696 kvartajn paĝojn kaj multaj ilustraĵoj. Pri ia skolo oni ne povas ankoraŭ paroli: pli ĝuste la revuo fariĝis poluso de altiro por la aktivaj verkantoj el la diversaj landoj (14, se mi bone kalkulis): foliumante oni salutas la nomojn de Jaume Grau Casas, Helmi kaj Hilda Dresen, Nikolao Hohlov, Raymond Schwartz, Jan van Schoor, Stanislaw Braun, Zanoni, Rudolf Hromada kaj tiom da aliaj! Sed oni ne povas diri, ke tiuj aŭtoroj havas inter si alion komunan, ol la talenton verki Esperantlingve, aŭ ke ili ricevis fortan influon de la Budapesta grupeto. Kio frapas la atenton, male, en tia foliumado, estas unuflanke la iompostioma memaserto kaj memplenumado de la ĉefaj roluloj, Baghy kaj Kalocsay, aliflanke la vekigo de novaj pli junaj vort-artistoj.

Dum tiuj kvar jaroj Baghy kontribuis nur per originalaĵoj, kiuj, komence ankoraŭ iom palaj aŭ skemaj, rapide akiris la varmecon, melodiecon kaj patoson, kiuj distingas lian poezion: 2 teatraĵetoj, 4 kanzonoj, 15 poemoj, 6 noveloj kaj la komencaj ĉapitroj de lia unua romano, krom multaj recenzoj, sub la plumnomo »Jobo«. Sed precipe Kalocsay elmontras mirindan fekundecon: unu proza humuraĵo, tradukita el Molnar, 19 poemoj originalaj, 25 tradukitaj (el la hungara, la franca, la germana, la angla, la greka ktp); krome en la angulo titolita jen »Disputo«, jen »Leterkesto«, kies plej grandan parton li redaktis mem sub la pseŭdonimo »Kopar« (kiu cetere entenis hungaran vortludon), en liaj artikoloj pri la ritmo, la asonanco, la rimoj, en liaj recenzoj pri la Oficiala Radikaro kaj pri la Enciklopedia Vortaro de Wüster, pri ties »Verhältnisswörter en Esperanto« aŭ la »Handwörterbuch« de Karl Minor, oni trovas jam la skizon, kaj ofte pli ol skizon de la doktrino, kiu kondensiĝos poste en liaj didaktikaj verkoj, kaj oni ekkonscias, kiel serioze kaj profunde li jam konsideris la problemojn de la lingvo kaj de la arto.

Sed la altirforto de tiu duopo ne limiĝis al iliaj kontribuoj en »Literatura Mondo«: la apero en 1922 de »Preter la vivo« diskonigis en Esperantujo la nomon de Baghy: la unuan fojon oni aŭdis lirikon de melodia, bildriĉa, ardatona inspiro, kiu plektis la Esperantajn vortojn al sia kantado sen ia ĝeno, kun la sama natureco kaj fluideco, kiel la vortoj de malnova nacia lingvo; tio estis ia revelacio de la poezieco de Esperanto. La alia evento estis en Novembro 24 la publikigo de la »Tragedio de l' Homo«, la potenca ĉefverko de Madàch, en sia nova Esperanta vesto. Ne hazarde aŭ kaprice Kalocsay entreprenis tian malfacilan kaj pezegan laboron: li tro bone aŭskultis la diron de Zamenhof, ke »estas tre dezirinde, ke ni ne evitu malfacilajn tradukojn, sed kontraŭe, ke ni ilin serĉu kaj venku, ĉar nur tiamaniere nia lingvo plene ellaboriĝos«, kaj li tro bone atentis la ekzemplon de Grabowski, kun kies »Sinjoro Tadeo« li evidente volis rivali, kaj super kiu li triumfis. Liajn tiamajn spertojn oni povas trovi en ĉi tiu peco de recenzo (1925): »Ofte oni diras, ke Esperanto estas vivanta lingvo. Kaj tio ja estas vera. Tio signifas, ke Esperanto havas sian propran spiriton, kaj gramatike senerara lingvaĵo povas impresi peze, fremdmaniere, se ĉi tiu spirito mankas. Granda ekzerco, funda studo, vigla sento pri la logiko kaj gusto de la lingvo, sagaco, sprito, eltrovemo kaj ama pacienco necesas, por ke tradukante oni povu kontraŭstari la tentantan spiriton de la nacia lingvo kaj tamen reprodukti ĉiun stilspecialaĵon per Esperanta ekvivalento aŭ per ĝenerale komprenebla, sed tamen frapanta kaj suka esprimo.« Profeta koincido: tiujn vortojn li skribis okaze de la traduko de tiu »Reĝo Lear«, kiun li mem devis, post longa tempo, tiel majstre esperantigi!

Ne estas do mirinde, se tiuj du artistoj de la parolo kaj de la verso fariĝis por la junaj verkemuloj objektoj de admiro kaj de imitado. En 1923 Karlo Bodó, kiu tiam estis dudekjara, kontribuis al L. M. per mallonga proza traduko, kiu ankoraŭ montris kelkajn mallertajojn; sed jam en la tradukitaj noveloj de la sekvanta jaro manifestiĝas plene lia talento de arta prozisto, tiel ke li tiam eniras en la Redaktan Komitaton. Eĉ inter 25 kaj 31, en tiu periodo de vintrodormo de la Revuo, ne ĉesas la altiriĝo: Lajos Totsche, Lazlo Halka kaj Ferenc Szilágyi tiam aliĝis al la grupo de la iamaj redaktoroj, kaj oni povas jam paroli pri formita skolo, kiu pruvos fajre sian ekziston en la renaskiĝinta revuo. Ĉar en Januaro 31, sub tute modernstila kovrilo kaj sur glacea papero, reaperis »Literatura Mondo«, kun la du samaj ĉefredaktoroj, jam helpataj de Bodó kaj Szilágyi, dum la instiginto estis la juna Vilmos Bleier; tiu estis samtempe la administranto, la teknika aranĝanto kaj la ĉefa posedanto de la revuo kaj de la eldonkooperativo, kiun li baldaŭ alkroĉis al ĝi, por iom malkreskigi ties deficiton, AELA — l' Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj. Nur al lia senlaca kaj multflanka aktiveco la revuo ŝuldis sian longan vivon, ĉar la kaŭzoj, kiuj interrompis ĝin en Aprilo 1938 ne estis tiaj, ke eĉ plej genia elturniĝemulo povus ilin kontraŭbatali. Dum tiuj sep jaroj presiĝis 68 numeroj, prezentantaj 1582 paĝojn kvartajn: respektinda monumento, en kiu ĉeestas ĉiuj gravaj nomoj de la tiutempa literaturo; sed inter ili aparte nin frapas la novaj, ankoraŭ ne viditaj — oni pardonos, se mi citos nur kelkajn, laŭ la hazardo de la tralego — Miloš Lukaš, Ivo Rotkvič, Henri Vatré, Lejzerowicz, Halina Weinstein, Hromada, Magda Carlsson, Saint-Jules Zee ktp. Tiuj jaroj estis cetere la granda epoko de la du Budapestaj majstroj: Baghy, kiu jam publikigis du romanojn kaj du poemarojn, donas dum ĉi tiu periodo sian trian romanon »Sur sanga tero« (1935) kaj sian trian versvolumon »La vagabondo kantas« (1933) kaj ĝajnas, ke en tiuj du verkoj li atingas la supron de sia arto. Kalocsay sinsekve kolektas siajn originalajn poemojn en »Streĉita kordo« (1931), aldonas al la antaŭaj tri majstrajn tradukojn: »Eterna Bukedo«, »Hungara Antologio« (la poezia parto), la »Infero« de Dante — ĉiujn en unu jaro, 1933; intertempe en »Lingvo, Stilo, Formo« (1931) li elmetis la bazojn de la metrikaj kaj lingvaj esploroj, kiuj trovas sian definitivan formuladon en la »Parnasa Gvidlibro« (1932) kaj la »Plena Gramatiko« (1935), du verkoj, en kiuj mi havis la grandan honoron kunlabori.

Estas malfacile el la simpla legado de tiuj vivoplenaj kaj diversaspektaj kajeroj de »Literatura Mondo«, rekonstrui la internan, spiritan atmosferon de la Budapesta skolo en tiu tempo. Ni bedaŭras,

ke neniu el ĝiaj anoj transdonis al ni siajn memoraĵojn, ke neniu priskribo pentris al ni la kunvenojn de la redaktaro, la ambiciajn elpensojn, la aŭdacajn proponojn — kaj la malvarmigan realismon de la eldonisto. Ĉar ankaŭ tio apartenas al la historio de nia literaturo kaj estis inda je ĉies atento. Nur de ekstere oni povas iom diveni pri la ardeco de la diskutoj, kaj ni almenaŭ scias, ke unu fojon ili kondukis al disiĝo, disiĝo bedaŭrinda por ĉiuj: mi aludas la foriron de Baghy; kaj ĉar por multaj ĝi estis intime ligita kun la kverelo pri la neologismoj, mi devas koncize rakonti pri tiu epizodo.

La kverelo pri la neologismoj

Verdire tiu kverelo, en sia komenciĝo, ne rekte koncernis »Literaturan Mondon« nek ĝiajn kunlaborantojn, kaj la disiĝo de Baghy havis kun ĝi nur okazan rilaton; sed la memoro de la homoj emas simpligi la aferojn, kaj iafoje ilin konfuzi. Mi do penos doni la necesajn precizojn. Iom antaŭ sia morto, en Majo 31, Cart, la tiama prezidanto de la Lingva Komitato, petis la Direktoron de la Sekcio »Komuna Vortaro«, mian majstron kaj amikon Grosjean-Maupin, pretigi la »Kvinan Oficialan Aldonon al la Universala Vortaro«, kies publikigo devus signi iom longan paŭzon en la riĉigado de la oficiala vortaro. Grosjean-Maupin kaj li samopiniis do, ke en ĉi tiun Aldonon oni enkondukos konsiderindan nombron el la vortoj uzitaj de Zamenhof (William Bailey eĉ insistis, ke oni oficialigu ilin ĉiujn), kaj ĉar Grosjean-Maupin jam malsanis, li petis min kompli la liston laŭ liaj indikoj. Mi diskutis liajn proponojn kaj mem proponis vortojn, kiujn mi kolektis el Kabe kaj el aliaj aŭtoritataj verkistoj. La listo entenis fine 220 radikojn, el kiuj nur 14 ne troviĝis en la unua eldono de la »Plena Vortaro«: 10 teknikaj: **balgo, morkelo, padeli, pario, perpendikulara, sanitara, sekvestri, skombro, staplo, vinkto** — kaj 4 aliaj: **gapi** (ekuzita de Schwartz), **hasti** (de Jung), **strika** (de Zamenhof) kaj **stumpli** (de Kalocsay). Bedaŭrinde, la sekretario de la Lingvaj Institucioj, Lajarte, kiun la malapero de Cart lasis iel senhelpa, dissendis tiun liston de proponoj ne al la Akademianoj, kiuj, laŭkutime, devis ĝin kribri post interkorespondo sufiĉe facila pro ilia malvasta nombro, sed rekte al la Lingvo-Komitatanoj, kiuj ne estis preparitaj por tia laboro. Kaj tio ekzistis en Junio 32, ĝuste kiam vidis la lumon nia »Parnasa Gvidlibro«, en kies fakvortaro mi listigis la tiam uzatajn aŭ proponitajn novajn vortojn poeziajn: nia intenco kompreneble estis tute alia, ol tiu de la Direktoro de la Akademia Sekcio: ni tute ne deziris ilin trudi al la verkistoj, ankoraŭ malpli al la simplaj esperantistoj; ni volis nur ilin registri kiel eble plej komplete, fiksi ilian formon kaj precize difini ilian sencon aŭ

nuancon, iniciativo cetere tute aprobita de Grosjean-Maupin, al kiu mi jam antaŭ la publikigo komunikis la manuskripton. Sed la koincido de publikigo de tiuj du tre diferencaj listoj konfuze impresis la spiritojn, kaj kelkaj rapidjuĝaj Lingvo-Komitatoj, kiel ekzemple Fischer-Galati, suspektante ian diablan planon ruinigi la fundamentojn de la lingvo, komencis pasian agitadon kontraŭ la projekto de »Kvina Aldono«; li asertis, kun la aplombo de la nescianto, ke du trionoj el la vortoj proponitaj por oficialigo estas »la rezulto de malpene-meco, de troa ekzakteco, de infana vortfabrikemo« ktp.: des pli malbone por Zamenhof kaj Kabe, kiuj garantiis plej grandan parton el ili! Mi rakontis aliloke la sekvojn de lia interveno por la oficiala radikaro. Sed ne tio interesas nin ĉi tie. En la numero de »Literatura Mondo« de Novembro 32 aperis recenzo pri la »Parnasa Gvidlibro«, en kiu Paul Bennemann esprimis, kvankam en multe pli inteligenta kaj ĝentila formo, iom similajn antaŭtimojn pro la publikigo de la Poezia Fakvortaro. En sia respondo en la Decembra numero, Kalocsay rebatis, ke la vera malsano ne estas la uzo de neologismoj, sed la fanatika opozico al ili: »Pri la 50 ĝisnunaj neologismoj de »Literatura Mondo«, li skribis, sur proksimume mil libropagoj, estiĝis tuta aparta literaturo; oni parolas pri »sufoka atmosfero«. Sed oni forgesas, ke ĝi estas beletra revuo kaj donas multajn poemojn, do ĝi uzas ne sole la komunan lingvon, kiel raporta aŭ propaganda gazeto«. Vane, tiujn prudentajn konsiderojn oni ne atentis, liajn argumentojn pri la neceso de novaj vortoj en la tradukado de altaj ĉefverkoj oni ne penis diskuti: la lingvo, la religio kaj la politiko estas tri aferoj, pri kiu paroli senpasie kaj juĝi racie estas super la fortoj de plejmulte el la homoj.

Skolo kun granda rezisto-kapablo

En tiu tempo okazis inter Baghy kaj Bleier pluraj malkonsentoj. kiujn sufiĉe klarigis la malsameco de la karakteroj kaj funkcioj; kaj kun sia ordinara vervo kaj sprito Baghy ne povis rezisti la tenton eluzi tiun favoran aktualecon, por publike apartigi sin de la redaktaro de la Revuo. En Januaro 33 li heroldis sian disiĝon per poemo el 64 versoj, en kiun li amasigis kun mirinda lerteco 130 neologismojn (inter kiujn li pro distriĝo enŝovis tri el sia propra sigelo):

La bruska burgo, orgojla fortreso:

la **Fundament'** morozas sur la mont',

kaj infre semas sur ruoj, novaloj

doktecon — Literatura Mond'...

Tio estis facila ŝerco, kiun rebati per la sama procedo estus egale facile, kiel poste montris Maŭra:

Malsen respekto mi nun malrektigas min malpost la ardo,
kiu mem malestingiĝis en via malina maldorso...

Vere estas, ke kelkajn monatojn poste, en Decembro 33, Baghy volis en sian finofaran artikolon enmeti noblaniman reĝustigon: »Malutili al la gazeto mi ne deziras, kaj pro tio mi deklaras, ke ne pro principaj diferencoj lingvaj mi adiaŭas de miaj budapeŝtaj kolegoj«. Sed la impresado estis farita, kaj ne restis sen eĥoj: inter aliaj, la Japana Kongreso, la 3an de Novembro 33, voĉdonis unuanime rezolucion, kiu asertis, ke »spite de la sofismoj de anoj de tiel nomata »literatura fako«, ia fako speciale nomata »literatura« en Esperanto ne povas ekzisti, kaj oni ne povas formi ian fakan vortaron literaturan«; ke, cetere, »neologismoj pro bezono de poemfabrikado estas nenio alia ol la degenerado de la arto poezia«. Kaj tiujn kuriozajn postulatojn la Rezolucio pravigis per la fakto, ke »ni, ekstrem-orientanoj, povas fari pli objektivan juĝon pri la internacio ol la eŭropanoj, kies lingvoj estas tro proksimaj al Esperanto«. Kiam oni scias, kigrade la kuranta lingvo de edukita japano abundas je fermdvortoj devenantaj precipe el la ĉina kaj el la angla (unu konata poŝvortaro por la ĉiutaga uzado entenas simple dek mil fremdvortojn el eŭropa origino!), oni gustumas la humurecon de tiu senapelacia verdikto.

En efektiveco temis pli ĝuste pri krizo de kreskiĝado. La radikaron de Esperanto Zamenhof komence tenis inter tre striktaj limoj, ĉar la malgrandeco de la lernotaĵo ŝajnis al li la nepra kondiĉo de la propagando. Kaj tiel ja okazis dum la unua periodo de la movado; sed baldaŭ laŭgrade kiel la movado atingis pli vastajn tavolojn de la internacia publiko, pli kaj pli trudiĝas la bezono de pli larĝa vortprovizo. Zamenhof tion tre bone perceptis, kaj lia verkaro atestas pri lia realisma respondado: la »Unua Libro« de 1887. entenis 904 radikojn; la »Universala Vortaro« de 1894. entenis ĉ. 2.600; kaj la nombro de la radikoj plue uzitaj de li ĝis la fino de lia vivo kaj ne entenataj en la »Universala Vortaro« sumiĝas ĉirkaŭ 3.400. Kompare kun tiuj ciferoj, la kelke 300 neologismoj proponitaj de la »Parnasa Gvidlibro« simple por la beletra uzado, devus aperi al malvarmsanga homo kiel bagatelaĵo. Sed la pasia reago de la granda plimulto el la aktivuloj montras, ke tiuj tri cent vortoj kaŭzis tre profundan sentoŝokon, malfacile difineblan je la nivelo de la racio. Sendube la Ido-skismo lasis ĉe multaj el la respondeculoj de la movado vundolokojn, kiuj dolore impresiĝis ĉe la plej malgranda suspekto de reformemo. Sendube ankaŭ ĉe multaj la iel mistika alligiteco al la Interna Ideo, eĉ

al la homaranismo, koloris la »karan lingvon« mem kaj ŝirmis ĉiun el ĝiaj vortoj per ia sentimentala tabuo. Sendube fine la praktikado de la admirinde oportuna sistemo de afiksado kaŝis al multaj la fakton, ke ĝi prezentis rimedon de faciligo kaj ne absolutan principon, al kiu efektive ne mankas esceptoj (se »malfermi«, kial ne »malmorti«? se »malbona« kial ne »malblanka«?). Sed ĉio tio ne sufiĉas, por klarigi tiel ĝeneralan indignon: eble, tute sube, kuŝis io, kion oni povus nomi komplekso de malsupereco: ke poeto arogas al si fari distingon inter **malmola** kaj **tenera**, aŭ preferi **tristi** al **malgaja**, tio ŝajne ofendis kiel netolerebla kaj kontraŭdemokratia privilegio.

Kiel ajn estis la klarigo, oni povas nur admiri kaj aprobi tiun forton de inercio, tiun kapablon de rezistado, kiuj estas signoj de vivanta, sana lingvo. Sed ĉu aliflanke ne estas same egale ia signo de vivanta, sana lingvo, se tiu lingvo produktadas altvaloran literaturon, se ties aŭtoroj, malgraŭ avertoj, kritikoj aŭ eĉ fojfoje insultoj, plu daŭrigas sian leksikologian prilaboradon? La maljuna apostato Kabe, intervjuita de Jean Forge (24. VI. 31), ja distranĉis tiun Gordian nodon: »La poetoj estas danĝeraj homoj... Ĉu vi scias, sinjoro, se mi estus tia via komisaro, mi entute malpermesus tiujn poetojn!«. Sed ĉu tio ja estas solvo? Kaj ĉu la solvo ne estus pli ĝuste, kiel tiutempe jam indikis Kalocsay, en la alia direkto: starigi la liston, ne de novaj poeziaj vortoj, sed ja de la nepre lernendaj prozaj vortoj, necesaj, al la aktiveco de la ordinara esperantisto? Tian »bazan radikaron oficialan« nun provas ellabori la Akademia Sekcio pri la Komuna Vortaro, je la instigo de ĝia Direktoro, mia amiko Albault, kaj oni povas esperi, ke tia distingo kaj apartigo de la vivnecesa vortprovizo disde la luksa vortotrezoro alportos iom da paco sur tiu kruele pribatalata kampo.

La influo ekster Hungario

Intertempe tiuj akraj disputoj tamen ne fortimigis la junajn verkistojn; estas eĉ karakterize, ke tiu ŝtormo ŝajnis por la Budapesta skolo la okazo etendi sian influon ekster Hungarujo. Kaj kvazaŭ por akcenti tiun fekundecon, en 1934. Kalocsay mem aranĝis kaj prezentis, en delikate analiza antaŭparolo, antologieton de la nova poezio; li kolektis la plej belajn versaĵojn de »Dekdu Poetoj«, tio estis: du angloj (B. Price-Heywood, L. N. Newell) du estonoj (Henrik Adamson, Hilda Dresen), du hispanoj (G. F. Maura, Amalia Nunez-Dubus), du hungaroj (F. Szilágyi, L. Totsche), du aŭstroj (N. Hovorka, A Schaubhuber), unu letono (N. Kurzens) kaj unu usonano (E. C. Stillmann): larĝe malfermita ventumilo, kiu plej bone atestas pri la altirforto de la Budapesta skolo. Vere Kalocsay asertas en la komenco, ke la »fakto,

ke ili ĉiuj debutis sur la paĝoj de »Literatura Mondo« estas la sola fadeno ilin kunliganta«; sed tiun frazon ni rigardas nun kiel modestaĵon. Ĉar oni ne povas forigi la impreson, ke io pli forta ol simpla kunlaborado al unu revuo kunigis tiujn poetojn, ke en ĉiuj iliaj voĉoj, kiel ajn diversaj estas iliaj kantoj, oni rekonas ian apartan vibradon, ian distingon sonoron; ke tiu vibrado kaj tiu sonoro ne estas sen similo en la poemaroj de Baghy kaj de Kalocsay; ke fine, sen la ekzisto de tiuj du ĥorestroj, la juna ĥoro ankaŭ ne ekzistus. Tion mi pensis kaj diris jam tiutempe kaj tio ŝajnas al mi ankoraŭ nun veraĵo. W. B. Johnson skribis, ke »la Budapestaj verkistoj ricevis ian similecon de stilo, kiu ne estas facile difinebla, kaj kies rekoneblo ne dependas simple de konata neologismemo.« La sekretoj de tia stilkomuneco kuŝas eble en ilia sinteno antaŭ la lingvo kaj la arto. Ĉiu konsciis, ke, por ekspluati plene la artajn eblojn de Esperanto, oni devas antaŭ ĉio trakti tiun lingvon kiel vivantan, t. e. ne aliri al ĝi el sia nacia lingvo kun ties apartaĵoj kaj idiotismoj, ankaŭ ne manipuli ĝin kiel materialon por teoriaj eksperimentoj, sed humile kaj aŭte, alproprigi al si la tradician akiritaĵon el la verkoj de ĝiaj klasikuloj, Zamenhof kaj Kabe, kaj nur sur tiu fortika ŝtofo albrodi personan stilon. Kompreneble la teknikaj ellaboraĵoj, alportitaj al la Esperanta metriko kaj prozo, ne povis resti ignorataj de tiu nova generacio da verkistoj, kaj ankaŭ tio povas klarigi ilian familiecan mienon. Kaj fine certe influis ilin la granda ekzemplo, kiun donis Baghy kaj Kalocsay per sia dediĉiteco al la arto, per sia kulto de la lingva beleco. Kalocsay ie konfesis, ke la traduko de la Goeta »Sorĉleranto« prezentas la frukton de trijara prilaborado. En epoko, kiam oni zorgis antaŭ ĉio pri la facila propagandebloco de Esperanto kaj pri ĝiaj praktikaj aplikoj, tiu instruo pri la digno de la literaturaj valoroj estis bezonata kaj fekunda.

La duan periodon de »Literatura Mondo« abrupte interrompis la grandaj manovroj de la hitlerismo triumfanta, jam antaŭ la eksplodo de la dua mondmilito. En tiu katastrofo pereis, tute aŭ parte, pluraj valoroj verkoj de AELA, la plej bedaŭrinda estas tiu nova antologieto de »Naŭ Poetoj«, de kiu restis eĉ ne unu kompleta ekzemplero. Kaj tamen, trans tiuj kvar el la plej nigraj jaroj de la homa historio, transvivis la mirinda energio de la Budapesta rondo: en Januaro 47

aperis la unua numero de la Tria Periodo de »Literatura Mondo«, kaj sur ties unua paĝo Kalocsay, resumante la pasintaĵon kaj planante la estontecon de la revuo, akcentis la vakuon, kiun lasis la morto de Vilmos Bleier: »Ĉu entute estos eble efektiviĝi liajn vastajn projektojn sen lia granda agemo, kapablo kaj entuziasmo?« Feliĉe fortike staris plu la ĉefoj el la malnova gvardio, Kalocsay, Szilágyi, Tarkony (la iama Totsche) kaj Baghy; feliĉe Bela Blier prenis sur sin la taskon de la mortinta frato, kaj la nova etapo tiam ŝajnis promesplena... Oni scias, kiel la glaciigo de la internaciaj rilatoj malpermesis en Aŭgusto 49 pluan ekzistadon de tia internacia renkontejo, kia estis »Literatura Mondo«; sed dum tiu mallonga tempo regule aperadis 16 duoblaj numeroj, kun 512 paĝoj samformataj, kvankam ne ilustritaj, kaj la abonantoj eĉ plimultiĝis, atigante 600 en la jaro 48.

Dispeleniĝo de la skolo

Se la dua periodo de »Literatura Mondo« estis la tempo de la florado, la tria fariĝis kvazaŭ la sezono de la dispeleniĝado. Sajnas, ke prepariĝis jam la formiĝo de la novaj grupoj, kiuj, ĉiu kun sia regiona karaktero, certigos la pluecon de la kolektiva enterpreno. Jam el inter la novaj kunlaborantoj oni ekvidas la estontajn kolonojn de la grupo skota (Reto Rossetti, William Auld, John Dinwoodie), de la ĉeĥo-slovaka (Karolo Piĉ, Tomaŝ Pumpr), de la skandinava (Poul Thorsen) de la jugoslava (Boĵidar Vanĉik), ĉirkaŭ kiuj kunvenos poste tiom da junaj talentoj. Tiele, post kiam ĉiuj konvinkiĝis, ke la silentiĝo de »Literatura Mondo« estas definitiva, povas diversloke aperi novaj junaj revuoj, kiuj aspiras anstataŭi la gloran malaperintan — kaj mi estus la lasta, kiu volus eĉ iomete depreni el iliaj meritoj kaj atingoj. Tamen en mia maljuna koro neniuj el ili povas iam teni la lokon de la patrina revuo, kiu instruis al ni ĉiuj, kio povas kaj devas esti la Esperanta literaturo, kaj sur kies paĝoj ni lernis la arton kunplekti kaj kantigi la Esperantajn vortojn. Kaj, se per tiu ĉi tro klare malperfekta provo mi ne sukcesis fari la historion de la Hungara Skolo, almenaŭ mi plenumis mian intencon, montri omaĝan dankon al tiu skolo, kiu en la prozo de Baghy, de Szilágyi kaj de Bodó, en la poezio de Kalocsay, de Baghy kaj de Tarkony donis al ni ĉiam imitindajn modelojn de pura lingvo kaj de alta stilo.

SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio
Esperantista, Vol. 18. n-ro 1 (1967)

003.344 (091)

HISTORIO DE LATINA ALFABETO

(Josef Chvosta, Ĉeĥoslovakio)

Sen ĉiaj ajn diskutoj la invento de la skribarto apartenas al la plej grandaj sukcesoj de la homara kulturo. Oni nepre ne kapablas imagi la evoluon de la homara civilizado sen literaro. Nur la literaro ebligas konservi kulturon por posteuloj kaj nacioj, kiuj ne venis al kono de la skribarto aŭ kiuj ne ellernis ĝin de ceteraj pli kulturaj nacioj, malaperis en la historio tiel, ke oni eĉ ne konas iliajn nomojn. La literaro ja signifas ankaŭ la komencon de la fakta historio, ĉar pri pli fruaj historiaj agoj povas atesti, sed certe ne tiel perfekte kiel skribita postrestaĵo, nur arkeologia objekto. La literaro estas noto de parolo, ĝi estas konservado de aliel momenta ideo, ĝi ebligas konservi la frazojn, kiuj iam estis elparolitaj kaj kiuj aliokaze povas esti nur neprecize memorataj. Per literaro oni povas pli facile komuniki kaj transdoni ideojn, instruojn kaj sciencojn. La literaro kreis ankaŭ naciojn el unuopaj triboj, konstantigis la lingvon, kiu aliel ŝanĝiĝus tre rapide ja la literaro ebligis al la nuntempo eĉ konon pri lingvoj, kiuj jam antaŭ longe ĉesis esti parolataj.

Ekesto de literaro

La literaro ne ekestis subite, ne estis ia donaco de dioj, eĉ se la mitologio parolas pri tio. Sed la literaro trairis longan evoluon el interkonsentitaj signoj, kiuj nur helpis kaj subtenis la memoron, ĝis nuntempaj statoj. Unue aperadis piktografoj aŭ petroglifoj, kiuj estis »skribitaj« sur diversaj materialoj kaj kiuj estis notoj de posedado, subtenis la memoron pri certaj memorendaj ideoj kaj servis por primitivaj, simplaj komunikoj en amaferoj, en ĉasado, pri magiaj formuloj, pri militoj, konfliktoj kaj aliaj okazaĵoj de tiama homa socio. Tial ĉiuj literarsistemoj estas en la unua etapo bildetoj, sed tiuj bildetoj estas pro manko de artisma talento, pro malperfekteco de materialo